# N I A   V O Ĉ O
## Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**NOVEMBRO 2006**


**LA 66a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS EN PALOS DE LA FRONTERA**
Inter la tagoj 5a kaj 8a de Julio 2007 okazos en Palos de la Frontera (Huelva) la 66a Hispana Kongreso de Esperanto. Ĝi okazos kune kun Kongreso de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Oni demarŝas por atingi ĉeeston de portugalaj esperantistoj profitante la proksimecon de tiu urbo al Portugalio.

**BANKEDO POR FESTI LA ZAMENHOFAN TAGON EN MADRIDO**
Sabaton la 16an Decembro je 14.00 okazos bankedo en Restoracio Candilejas II, str. Candilejas, 32, Vallecas, proksime al Asamblea de Madrid. Aŭtobuso 57, eliranta el Atocha stacio, haltejo Eroski; Renfe-stacio "Asamblea de Madrid-Entrevías" (unua post Atocha de la linio al Alcalá de Henares) metroo Portazgo, 15 minutojn piede. Proksimuma prezo 20 eŭroj. Bonvolu rezervi ĉe Pedro Hernández, telefonoj 912 234 853 kaj 667 721 951, retpoŝto esperantio@ono.com . Se ekzistos taŭgaj teknikaj kondiĉoj, oni projekcios la filmon "Gerda malaperis".

**KURSO DE ESPERANTO EN LIBRERIA MUGA, VALLECAS, MADRIDO**
Senpaga Esperanto-kurso okazas ĉiusabate en Librería Muga, Av. Pablo Neruda, 89, Vallecas, telefonoj 915079084 kaj 915079085, gvidata far Pedro Hernández.

**ESPERANTO EN INTERNACIA KONGRESO PRI LA HISPANA CIVILA MILITO**
Fine de novembro okazos en Madrid Internacia Kongreso pri la Hispana Civila Milito, ene de la t.n. Jaro de la Historia Memoro, organizata de la Ministerio de Kulturo kaj la "Ŝtata Societo pri Kulturaj Kunmemoroj". Ulrich Lins kaj Toño del Barrio prezentis proponon pri komuniko al tiu kongreso, pri la temo "La uzo de Esperanto dum la Civila Milito" kaj ĝi estis akceptita. Toño del Barrio legos ĉe la Kongreso 15-minutan resumon de la artikolo, sed ĝi aperos kompleta en la Kongreslibro. La artikolo legeblas hispane kaj esperante en la adresoj:
http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/guerracivil.htm
http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/civilmilito.htm

**NOVA ESTRARANO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**
La nova redaktoro de "Boletín", Jorge Pavón, laŭ la artikolo 18-a de la statutoj de HEF, estas ankaŭ la nova voĉdonanto de la Estraro. Oni atendas baldaŭan aperon de la prokrastita Boletín.

**DISPONEBLA DVD "ESPERANTO ELEKTRONIKE"**
Hispana Esperanto-Asocio disponas por vendi kelkajn ekzemplerojn de la DVD "Esperanto elektronike". La multilingva eldono, kiu inkludas la hispanan kaj la katalunan, estas la plej ampleksa kaj la plej kompleta materialo pri nia internacia lingvo kaj bonega ilo por disvastigi Esperanton. (Ĝia prezo, 5 eŭroj, inkludas sendokoston al Hispanio)

**14a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO**
De la 24a de septembro ĝis la 1a de oktobro, pli ol 125 geesperantistoj el 12 landoj, plejparte francoj, kunvenis en la apudmara vilaĝeto La Pineda (Tarragona) por, en amika kaj agrabla etoso, partopreni en la 14a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, sub la aŭspicioj de la Hispana Esperanto Muzeo.
La tuta evento okazis en Hotelo "Karabela" apud la marbordo, kiu estis samtempe kunvenejo kaj restadejo. Inaŭguris la Semajnon la Urbestro, Josep Solé. Dum la inaŭgura sesio, prof.d-rino Rafaela Urueña emfazis kiel Esperanto plenumas ĉiujn kondiĉojn de Unesko por esti konsiderata kiel nemateria havaĵo de la homaro.
Okazis pluraj prelegoj: Wolfgang Gunter pri "Socia Plastiko" kaj pri "Libermerkata industrisekcio, medicino, monda socialforumo"; Hussein Al Amily pri "La araba mez-oriento kiel centro de atento"; Choi Man Won pri "Samaj kaj malsamaj en Aziaj Tri Landoj (Ĉinio, Japanio kaj Koreio). Ankaŭ debato, gvidita de Luis Serrano, pri la temo "Kial ankoraŭ ne triumfis Esperanto".
Okazis turismaj vizitoj al Montblanc, Lleida, Borges Blanques kaj Tarragona.
La teatra trupo "Ĝo-Jo", el Montpeliero, ludis amuzajn skeĉojn.
Oni prezentis la Vortaron Kataluna-Esperanta de Luis Serrano kaj Santiago Torné, eldonita far Barcelona Esperanto-Centro.
*(Resumita el raporto de Rafaela Urueña)*

**ESPERANTO EN AMASMEDIOJ**

En oktobro, Augusto Casquero partoprenis telefone ekde Pollando en la programo de RNE "Imaginario". Li parolis pri siaj spertoj en Bydgoszcz instruante Esperanton al gestudentoj el multaj landoj, kaj utiligante Esperanton por instrui la hispanan lingvon. Tre interesis al ili kion li diris pri la propedeŭtika valoro de Esperanto por la lernado de fremdaj lingvoj, kaj ĉefe la utilon de la internacia lingvo por instrui al ĉinaj gestudentoj (li havas nun 23) . *(Augusto Casquero)*

La ĵurnalo "El Correo" de Bilbao intervjuis al prezidanto de la loka grupo, José Luis Bringas, okaze de la 100-jariĝo de la Esperanto-Grupo de Bilbao.

Centjariĝo de la teleregilo. Antaŭ cent jaroj Leonardo Torres Quevedo montris sian "Telekino"-n en la haveno de Bilbao. La ĵurnalo "El Correo" dediĉis tutan paĝon al tiu evento, Post longaj klarigoj pri la "telekino" ĝi plu informas: "La sukceson oni ne povis nei, kaj post kelkaj tagoj, ĉe la "Sociedad Bilbaina", grava loka Institucio, oni lin omaĝis, kun donaco de la insignoj de la Karlo III Kruco. Kiel kurioza anekdoto, dum la bankedo oni parolis per nova lingvo kiu minacis revolucii la internaciajn komunikojn: Esperanto. Tio okazis ĉar Torres Quevedo estis fervora esperantisto. Pro tio ĉi tiu renkontiĝo ankaŭ estis kauzo por disvastigi tiun lingvon, konsiderata kiel utila kaj facila".
Dum tiu epoko estis membroj de tiu Societo kelkaj anoj de la Grupo Esperantista de Bilbao. *(Toño del Barrio).*

**ESPERANTO-KURSOJ EN UNIVERSITATOJ**

Dum la lernojaro 2006/07 okazos kurso de Esperanto en la Vaska Universitato, en Bilbao, kun oficiala valoro de 4,5 kreditoj (45 horoj).
Ankaŭ okazos kurso de Esperanto en la Universitato de La Laguna, Tenerife.

**EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO**

La 7-a Eŭropa Esperanto Kongreso okazos en Maribor (Slovenio) 28-a julio /4a aŭgusto. Pli da informoj: www.esperanto.net

**INFORMOJ DE EŬROPA UNIO ANKAŬ EN ESPERANTO**

Dum sia duonjara prezidanteco de Europa Unio, Finnlando dissendas rilatajn informojn, aparte de en la angla kaj franca, unufoje semajne ankaŭ en latino kaj en Esperanto. Alejandro Pareja faras la tradukon al Esperanto de la latina teksto.

**VIZITO DE FRANCA ESPERANTISTO AL HEF**

S-ro. Michel Dechy, prezidanto de la Esperanto-Klubo de Lille kaj Villeneuve d'Ascq (Francio), vizitis lundon la 30an Oktobro la sidejon de HEF. Li kunportis kaj vendis plurajn ekzemplerojn de la fama bildstrio “Tinĉjo en Tibeto”, en esperanta versio, kiun eldonis la menciita klubo.

**KONVERSACIAJ RONDOJ DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO**

Ekde la 18-an de septembro niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en la HEF-oficejo, RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79.

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid